

TUTMONDA KAPITALISTA KRIZO KAJ TUTMONDA LABORISTA KONGRESO

Esperanto ja estas vivanta lingvo, efika komunikilo kiu ebligis al homoj el malsamaj mondpartoj kaj lingvoregionoj kune renkontiĝi en Braŝovo dum unu semajno komence de aŭgusto. La celo de la kunesto estis ne nur fratetosa feriado, sed ankaŭ aktiva interkleriĝo de racie pensantaj progresemluloj kiuj bataladas por mondo sen espluateco kaj subpremo.

Dum Esperanto jam aĝas 123 jarojn, la kongresanta organizo fondiĝis nur tridekon da jaroj post ekapero de la revolucia lingvo, en 1921, dum epoko plej revolucia. Plu klasbatala kaj avangarda kultura asocio, **Sennacieca Asocio Tutmonda** (SAT), asocio de proletaj esperantistoj, ĉi jare fokusiĝis pri la temo "Ekonomia krizo kaj ties plurflankaj efikoj". Ĉar se en tempo de la soveta revolucio jam montriĝis, ke socialisma revolucio povas sukcesi nur mondscale kaj ne en izolita areo (eĉ se sesono de l' mondo), hodiaŭ tiu tutmondeco aperas eĉ pli okulfrappe pro la multloke akriĝantaj mondproblemoj de la homaro kiaj milito, malsato kaj pli ĝenerale vivŝancela mizero, ĉiuj ege kunligitaj al politik-ekonomiaj kondiĉoj.

La specifeco de SAT estas ke ĝi plenumas sian edukon, kulturen kaj klerigan taskon per rekta interkontaktigo de homoj spite al ilia nacia aŭ alispeca origino, formante senperan retaron de unuopaj individuoj. Bazante sian funkciadon sur reciproka interŝanĝado de spertoj kaj ideoj, la asocio ebligas al siaj membroj per konstanta utiligo de la perlingvo Esperanto akiri "eksternacian sent- pens- kaj agadkapablon" kaj partoprenas kompletige al la aktivado de neesperantistaj klasbatalaj organizoj, kiujn ĝi laŭeble helpadas per intima kunlaboro sur la kultura nivelo.



Alia kerna kuntea cemento de la asocio estas ĝia supertendenceco. Ĉar mem ne partipolitika, SAT bonvenigas ĉiujn progresemajn ideojn apogantajn la emancipiĝan strebon de la laboristaro tutmonda kaj lasas la respondecon al siaj membroj mem sendogmige forĝi al si propran opinion kaj elekti la vojon, kiun ili opinias plej rekta kaj irebla por forkonduko de la homaro al kiel eble plej kompleta atingo de socia kaj persona bonfarto.

Do konkrete la asocio plenumis siajn statutajn celojn okaze de la jara kongreso unuflanke jarkunsidante pri la asocia vivo, ties funkciado dum la ĵusa jaro kaj planinda agado por la venonta, aliflanke okazigante sociajn forumojn pri ĝenerale soci-politikaj temoj kadre de unu-horaj debatoj kun mallonga enkonduka prelegeto.



Temoj tuŝitaj ĉi jare estis interalie: sindikatoj en nuna Rumanio, rekta aktivismo en Koreio, rumana kulturo, etikaj bankoj, rasismo, laborista movado en la 20a jarcento, esperantismo (kiucele), ekonomia krizo. La konkludoj de ĉi tiuj diskutoj respreguliĝas en la kongresa deklaro.

Menciindas ankaŭ, ke la kongreso, apud la densaj cerbostreĉaj kunvenoj, flegis aparte riĉan kulturan programon, spektaklan, kaj aparte, ekskursan. Pri la spektakloj, indas emfazi la klopodojn por du muzikaj koncertoj far Braŝovaj lernejoj, kiuj kantis ankaŭ esperantlingve. Belege ludis kaj kantis ankaŭ la infankoruseto "Kanzonetta" en impresa kadro de preĝejo ŝirm-meze de la Prejmera fortikaĵo. Kaj miriga ankaŭ estis la perfekta prononcado de neesperantistaj aktoroj, kiuj lud-deklamis la *Kalvan Kantistinon* de Ionesco en la traduko de Georgo Lagranĝo (Georges Lagrange). Ekskurse okazis, interalie, vizito al Raŝnovo, Sibio, la urbo de Andreo Cseh, mejloŝtona esperantisto kiu popularigis la instruadon de Esperanto per rekta metodo, kaj ekskursoj al Bukareŝto kaj Sigiŝoaro, sen forgesi la postkongresan ŝip-ekskurson al la natur-protektejo de l' Danuba Delto.

ELDONOJ

Okaze de la kongreso estis eldonita tri novaj verkoj de la Eldona Fako Kooperativa:


- **Kanto Ĝenerala**, de Pablo Neruda, konsistanta el la naŭ poemoj, kiujn la interregiona koruso *Interkant'* prezentis divers-okaze kaj -loke (ĝis en la Nacia Teatro de Havano dum Universala Kongreso de Esperanto!), laŭ muziko de Mikiso Teodorakiso (Theodorakis);

- **Tuikero, la harkio, kaj la cetero**, de Roger Condon, originale verkita en Esperanto; atesto pri sperto de juna franca soldato dum la Alĝeria sendependiĝa milito;

- **Traktaĵo pri ateologio**, de Michel Onfray, eseo pri ateismo de nuna filozofo, kiu jam havis iom da internacia disvastiĝo tra nacilingvaj tradukoj en kelkaj landoj sed nun trafos tutmondan publikon per tiu esperantigo publikigita kun la entuziasma aprobo de la aŭtoro, kiu por la okazo verkis specialan antaŭparolon priskribante la lingvan problemon apogante Esperanton kiel babelturan solvon.

La Eldona Fako postkongrese jam eldonis plian verketon:

- **Songoj de Kristalo**, de Jérôme Leroy, scienc-fikcia novelo priskribante la viv-aventuron de du junuloj en glaciera mondo postindustria de 2064.



Sed la plej ambicia projekto kiun la Kooperativo entreprenas nuntempe estas la realigado de **dokument-filmo pri Esperanto**, de Dominiko Gaŭtiero (Dominique Gautier), kiu priskribas la konkretan realon de la esperanto-mondo nuntempe en 2010, kaj kiu finpretos en aprilo 2011 (pliaj informoj ĉe: <http://esperantofilmo.com>).

La librojn oni povas akiri pere de nia Libroservo libroservo@gmail.com

DEKLARACIO

La 83-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunvenanta en Braşovo de la 1-a ĝis 6-a de aŭgusto 2010, substrekas, ke ĝia Statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj. Ĉi jare, la kongresa temo estis «Ekonomia krizo kaj ties plurflankaj efikoj». La kongresanoj de SAT, gastigitaj de la frata loka asocio *Amikeco Braşovo*, debatis interalie pri sindikatoj en nuna Rumanio, rekta aktivismo en Koreio, rumana kulturo, rasismo, laborista movado en la 20a jarcento, esperantismo, ekonomia krizo. La Kongreso:

* kontentas, ke la konvencio de Oslo aplikiĝas de la 1-a de aŭgusto 2010 al ĉiuj ratifintaj ŝtatoj. Bedaŭrinde, 70 ŝtatoj subskribis sed ankoraŭ ne ratifis ĝin.

* skribis al la Ambasadoroj de Ĉinio, Finnlando, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio kaj Usono, en Rumanio por peti, ke tiuj landoj subskribu kaj ratifu la Konvencion de Otavo, kiu malpermesas ĉiujn kontraŭpersonajn minojn. De 5 jaroj, ĉiujare, SAT efektivigis, ĉe la ambasadoroj de antaŭcititaj landoj, la saman agon en la lando kie okazis ĝia kongreso. Ankaŭ ĉi tiun jaron, SAT petis, en letero, ke tiuj landoj subskribu kaj ratifu la Konvencion de Oslo, kiu malpermesas iujn pafaĵojetojn el bomboj,

* kontentas, ke Rumanio subskribis kaj ratifis la Konvencion de Otavo. Tamen la Kongreso skribis al la Rumania Ĉefministro por peti ke Rumanio subskribu kaj ratifu la Konvencion de Oslo. La letero rememorigas al Ĉefministro, ke la pafaĵoj, ĵetitaj el bomboj aŭ obusoj, neeksplozivitaj dum la ekfrapo sur grundon fariĝas fakte kontraŭpersonaj minoj,

* denuncas la financajn instituciojn situantajn en la landoj ratifintaj la Konvencion de Oslo, kiuj investas eksterlande en fabrikoj de pafaĵojetoj el bomboj. Ĝi petas, en la landoj ratifintaj la Konvencion de Oslo, kontrolon de la Registaroj ĉe la financaj institucioj por postuli la ĉeson de aktivecoj, kiujn la internacia juro malpermesas,

* subtenas la klopodojn de gek-doj el nia asocio en iliaj luktoj havi mondon sen armiloj,

* rememorigas la rajton de ĉiuj homoj memstare kaj libere vivi kaj loĝi tie, kie estas al ili plej taŭge, kaj aparte solidaras kun ĉiuj pro politik-ekonomiaj kialoj forpelitoj,

* konstatas, ke la 25%-aj salajromalaltigoj ĵus truditaj al Rumanio venas de la postuloj de la kreditoroj de la landoj, kiuj agadas kadre de IMF; tial ĝi sendas aparte fratecan saluton al aktivuloj, kiuj manifestacios kontraŭ la venonta kunveno de G20 en Seulo en novembro 2010,

* konstatas, ke la krizo ne plu ebligas kunvivadon inter salajruloj kaj kapitalistoj,

* interesiĝas pri la ĉi jare starigata Banko Eŭropa Etika (BEE) per kunfando de tri nunaj etikaj bankoj (Banca Popolare Etica el Italio, NEF el Francio kaj FIARE el Hispanio), konsiderante, ke tiu banko verŝajne agos per pli etikaj rimedoj ol aliaj bankoj, kaj aprobas la proponon, ke SAT tien deponu parton el sia mono,

* subtenas kunlaborojn inter SAT kaj aliaj frataj esperanto-asocioj kiel MAS (Monda Asembleo Socia) kaj IFEF (Internacia Fervojistista Esperantista Federacio) por projektoj, pri kiuj pluraj asocioj havas intereson komune agadi,

* substrekas la gravecon de la malfacilaĵoj i.a. estigitaj de naciismo kaj kapitalismo, kiujn regule frontas homoj kaj celas klerigajn interŝanĝojn de ĉiuj homoj por antaŭenigi nian komunan emancipiĝon.

Jam prepariĝas la sekva 84a kongreso, kiu gastos en la balkana urbo Sarajevo, inter la 30a de julio kaj 6a de aŭgusto 2011. Jam eblas aliĝi al ĝi je plej favora prezo, kaj legi la unuan bultenon.

MIGUEL HERNÁNDEZ EN ESPERANTO

Miguel Hernández, poeto de l' popolo estas la nomo de la libro kiu kolektis antologion de poemoj de unu el la plej gravaj poetoj de la dudekjara Hispanio. Li estas aŭtoro de verkoj amaj kaj kortuŝaj, kaj ankaŭ de aliaj kun socipolitika enhavo, kiu respegulis lian engaĝiĝon kun la plej mizeraj tavoloj de lia socio, kaj pro tio li estis enkarcerigita post la intercivitana milito, kaj mortis nezorgata kaj punita, tre malmulte da tempo post ĝia fino.

Dum tiu ĉi jaro oni memoras la 100-an datrevenon de lia naskiĝo, kaj tio ne povis resti ekster la apogo de la esperantistaro. Sabate la 12-an de junio la madridaj esperantistoj kunvokis omaĝon al la poeto, kiu konsistis en la legado kaj deklamado de liaj poemoj en du versioj: la originala hispana kaj la traduko en Esperanto.

Partoprenis niaj amikoj Ana Manero kaj la ankaŭ poeto Miguel Fernández Martín, tradukisto de la poezio de Miguel Hernández en Esperanton. La omaĝo okazis ĉe la Monumento memore al la poeto, en la madrida Parque del Oeste, je la 20 horo, kun la akompano de kvardeko de esperantistoj kaj amikoj.

m. hernández,
poeto de l' popolo
poem-antologio



hispana literaturo

PLENA ILUSTRITA VORTARO EN LA RETO

» La organizoj *Edukado@Interreto* (E@I) kaj *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT) intencas krei retan kaj senpagan version de la fama PIV - **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto**. Por tiu celo estis jam subskribita kontrakto, laŭ kiu E@I kreos la retejon kaj SAT disponigos la enhavon - la elektronikan version de la fama vortaro.

La projekto de reta PIV havas pli altajn ambiciojn, ol esti nur simpla cifereca versio de la papera eldono. Ĝi havos forumon por ĉiu unuopa vorto, kiu ebligos viglan diskuton pri diversaj terminoj. Ĉiu povos kontribui.

Pliaj informoj en www.vortaro.net.

La 23-an de oktobro okazis prelegaro pri Esperanto en Ciudad Real (*Reĝurbo*), urbo en la regiono de Kastilio-Manĉo, en la sidejo de la anarĥista sindikato CNT, en kiu partoprenis pluraj membroj de nia asocio. Ĝi vekis grandan intereson inter multaj junuloj, kiuj povis aŭskulti pri Esperanto, pri la historio de la ne-neŭtrala movado kaj pri la esperanta kulturo kaj literaturo.

Krome, danke al la ĉeesto de amikoj el Koreo, oni povis koni la porpacan agadon de niaj tieaj samideanoj de “La Solidareco”

Por kontakti kun ni:

SAT-en-Hispanio (Asociación Izquierda y Esperanto SATeH)

Poŝtkesto 8537, ES-28080 – Madrido (Hispanio)

esperanto@nodo50.org

<http://www.nodo50.org/esperanto/>